

Ĉiu scienca biblioteko devas posedi

la libron

### SCIENCAJ STUDIOJ

bazitaj sur originalaj esploroj kaj observoj

eldonita okaze de 50-jara jubileo de  
INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA

sub redakto de  
PAUL NEERGAARD

La libro enhavas 38 sciencajn artikolojn (alie nepublikigitajn), vertikaj de konataj sciencistoj el diversaj sciencaj branĉoj:

lingvistiko  
historio  
juro  
muziko  
poezio  
astronomio  
matematiko  
geologio  
mineralogio  
kemio  
tehnologio  
zoologio  
agronomio  
medicino ktp.

240 grandformataj paĝoj, pezo 25 danaj kronoj (anglaj ŝilingoj)  
aŭ 50 steloj aŭ 3,50 dolaroj aŭ la egalvaloro

**Mendebla** ĉe la

Eldonejo **KOKO**, Kolby Kaas. **Danlando**

pere de la librovendejoj, pere de la delegita reto de ISAE,  
aŭ kun la aldonita bankĉeko ĉe la sekretario de ISAE, al la  
adreso: Prof. D-ro B. Popović, Teknika fakultato, NIS, Jugoslavio.

### EL LA FAKOJ

(SCIIGOJ DE LA TERMINOLOGIA CENTRO DE I. S. A. E.)

(ISAE-TC-124)

(La fakoj estas envicigitaj laŭ la UDK. De nun ni uzos la simbolojn (mallongigojn) por lingvoj denove laŭ la esperantaj nomoj, do A angla, F franca, G germana, H hispana, I itala ktp.)

38 **Komerco.** — Aperis »Esperanto en Komerco«, kvinlingva raportaro pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo : 658 2, — — GM, ekde 10 libroj 1,35 GM. Esperanto-Rondo, 718 Crailsheim, BRD.

38; 658 **Komerco kaj Industrio.** — La Instituto por Esperanto en : 338.45 Komerco kaj Industrio (Dir.: S-ro E. L. M. Wensing, poŝtkesto 412, Eindhoven, Nederlando) preparas ampleksan »Komerca kaj Industria Vortaron« deklingvan inkluzive de Esperanto (aŭtoro: S-ro F. Munniksma), en kunlaboro kun T. C. de ISAE.

53 **Fiziko.** — S-ro R. Vetter, Nicolaas Anslynstraat 47, Amsterdam, Ned., deziras havigi al si terminaron de tiu parto de FIZIKO, kiu pritraktas la mekanikon de solidaj korpoj; li estas preta kunlabori en tiu fako.

539.1. **Atomfiziko, kernfendado.** — Sub instigo de dipl. ing. (kemio). Jean Dettwiller, prezidanto de la Esperanto-Fako de A. A. C. — C. E. A. — Centre d'études nucléaires de Grenoble du Commissariat à l'énergie atomique (Boite Postale 269 Grenoble (Isere), Francujo) — eldonigis en 1963/64 kvar sciencaj traktaĵoj esperantlingvaj, kiujn esperantigis el la franca s-ro Dettwiller.

54 **Kemio.** — Komence de 1966 aperis »Kemiaj afiksoj (internaciaj)« de dipl. ing. kem. Jan Pioro; 3-a aŭtoro eldono,



Varsovio; 69p., formato A5, hektogr.; kiun recenzis bona D-ro Nijveld, kompetentulo pri la kemia fako.

- 541.13 **Elektrokemio, Galvanizado.** — Terminaron de Elektrokemio kaj Elektrotegado (surfak-traktado de metaloj, elektro-metalizado) Eo-A kaj A-Eo eldonis Inĝ. John A. McCarthy, P. O. Box 213, Monroeville, Pa., 15146, Usono. Li ankaŭ estas direktoro de la traduk-servo »Interparl« kaj entreprenis traduki Esperanten el la angla la Kompendion »The Fundamentals of Electrochemistry and Electrodeposition« de Samuel Glasstone, en kunlaboro kun la T. C. de ISAE. Jam estas pretaj en manuskripto kelkaj ĉapitroj de tiu tradukaĵo. S-ro McCarthy estas inĝeniero en la »Applied research laboratory of United States Steel«.
- 61 **Medicino.** — D-ro A. Albault, la direktoro de la Akademia Sekcio pri la Vorttrezoro, 32, avenue Etienne-Billières, F-31 Toulouse 03, estas preparanta surbaze de sia medicina kontribuo al PIV, Medicinan Vortaron kun Eo-difinoj kaj kun etimologio kaj tradukoj al 5 lingvoj (A-F-G-H-R); antaŭvideble 70—80 p.
- 621.25 **Pumpiloj.** — En 1966 eldonos »Fakvortaron pri pumpiloj G-AF-H-I« la germana asocio VDMA. Dr-Inĝ. Dettinger (Pumpenfabrik en D-7417 Urach, BRD) intencas verki Eo-anekson.
- 621.3 **Elektrotekniko.** — Mag. inĝ. K. Siwicki (Varsovio) sciigis jene: La vortareto Eo-Pl de Grupoj 11-12-15-16-20 de International Electrotechnical Vocabulary, dua eldono, laŭ la plano de PEA devos esti multobligata dum 1966/67. Ĝi enhavos Eo-indekson alfabetan laŭ la modelo de Wüster. Siwicki tradukos la grupojn 45/Lumigo kaj 50/Elektrokemio kaj Elektro-metalurgio. Ambaŭ grupoj estas sub redaktado de la polaj kolegoj.
- 621.396 **Radiotekniko.** — Preparas Radioteknikan Vortaron R-Eo S-ro A. I. Jauŝkin, supera inĝ., Volgogradskaja 19-2, Kazan 34, Tatario, USSR. La vortaro ampleksas 18900 t. ĉefe de

- ĝenerala radiotekniko kaj ioma konato de necesaj terminoj el apudaj sciencoj — elektr., aŭtomatiko, matematiko, fiziko kaj kemio.
- 621.9 **Il-maŝinoj.** — Dum 1966 inĝ. A. Broise, F-28 Brezolles (Eure-et-Loir), komisiito de ISAE pri la Maŝinfaka Terminaro, daŭrigis poluri sian manuskripton de Ilmaŝina Terminaro, verkata surbaze de la »Vocabulaire technique trilingue« par Pierre Naslin, el kiu li ankoraŭ alprenis la ĉapitron pri proprecoj de materialoj kaj pri mezuradoj.
- 625.1/.6;  
656.2 **Fervojo.** — Aperis »Fervoja Terminaro« G-Eo kaj Eo-G (G.- Ritterspach), eld 1966 de Germana Esperanta Fervoja Asocio. 11,3 x 16,2 cm; broŝurita; 80 p., 2000 t.; prezo 6,50 GM plus 10% por afranko. Mendu ĉe: S-ro E. Ritterspach, 607 Langen, Berliner Allee 1, poŝtĉekkonto Frankfurt 276531.
- 628.8 **Hejtado, Ventumado, Klimatizo.** — Inĝ. Charles H. S. Donald, 89 Bramley Road, Ealing, London, W.5, intenacas kompili vortliston pri la fakoj hejtado, ventumado kaj klimatizo, por povi traduki teknikajn traktaĵojn esperanten el la angla.
- 629.11 ;  
625.7/.8;  
656.13 **Aŭtomobilistaj aferoj.** — En la numero 6-a de junio 1966 de la AUTO-REVUO eldonata de la Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA) — Redaktoro: UEA-Estrarano Maurice G. D. Jaumotte, De Bruynlaan 44, Wilrijh-Antverpeno, Belgujo — finiĝis publikigo de tre detala seslingva AUTO-TERMINARO. Ĝi enhavas ne nur la automobilteknikajn, sed ankaŭ la plej gravajn trafikteknikajn terminojn. Sub aŭspicio de la Terminologia Centro de ISAE nun estas reviziata la tutaĵo, por ebligi baldaŭan aperon de la verko en formo de presita libro.
- 656.835 **Filatelio.** — En GER, jarkolekto 1960, ekde la monato Marto laŭ monataj daŭrigoj aperis »Philatelistische Fachausdrucke, Deutsch-Esperanto, zusammengestellt von Hans Koch, München.« La listo enhavas proksimume 500 terminojn. TC sendis ĝin al nia s-ano Hans-Dietrich Neumann, kiu restadis dum unu jaro en Japanujo, kie li intencas



eldoni terminaron kaj multlingvan fakvortaron filatelian en kunlaboro kun la prezidanto de la »Societo de Internaciaj Plumamikoj« en Tokio. Li petis ke anoncu sin kiel eble plej multe da kunlaborantoj. Adreso: Ĝis Septembro 1966 poŝtkesto 10, Edogawa, Tokyo, Japanujo; post tiam denove Habelstraße 4, D-62 Wiesbaden (BRD).

66 **Kemia tekniko.** — La fabriko ZAVODŪ VITĚZNĚHO ŪNORA en Hradec Kralove, Ĉeĥoslovakio, sendis al TC de ISAE kolektaĵon de teknikaj raportoj en ĉeĥa lignvo. La 40-paĝa broŝuro el la jaro 1965 enhavas kvin traktaĵojn pri kemiteknikaj instalaĵoj kaj procezoj. Sur la unua paĝo troviĝas indekso de la artikoltemoj en 6 lingvoj, inter ili Esperanto.

R. Haferkorn

Ni petas bone noti

la novan adreson

de Scienc Revuo:

de Prof. d-ro Bož. Popović, **Teknika fakultato, NIŠ, Jugoslavio**

Je tiu adreso la ĉefredaktoro atendas pli multajn artikolojn, lingve korektajn, perspretajn (tajpitajn klare, kun interspacoj, nur unuflanke).

Je tiu adreso oni atendas ankaŭ pli multajn kaj regulajn abonojn — **la revuo aperos regule nur se la abonoj venados regule!**